# LA

# LIBERECANA

# PENSO

Kompiltraduko fare de
La Liberecana Frakcio de SAT.

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
115A 1977 2,50 FF

... J. LUKO
14, RUE BOURET
F-75019 PARIS

Informojn pri la Liberecana Frakcio de S.A.T. kaj ties organo "Liberecana Ligilo" la leganto de ĉi broŝuro povas peti de

**Kdo Pelle Persson, Svartviksvägen 14**
**S 123 52 Farsta, Svedio**

# N I A   C E L O

Publikigante tiun ĉi broŝuron - la unuan de serio , kiun ni projektas por diskonigi niajn liberecanajn ideojn al la esperantistaro - ni estas konvinkitaj, ke kiam etas la materialaj eblој,oni ne povas prezenti ion ĉiuflanke perfektan. Sed la ideoj nek cirkulas nek disfloras, kiam oni senfare atendas la perfekton. Estas ja preferinde komenci, donante vivon al tio, kion povas plibonigi tempo kaj strebo de ĉiuj interesatoj.

Jen kolekto da opinioj de la plej famaj verkistoj k pensuloj en la internacia anarkismo - opinioj pri la fundamentaj punktoj, kiuj diferencigas nin, liberecanojn, de la ideoj, kiujn penas pravigi la tuta arbitra sociorganizo aktuala. Kompreneble, ĉiulande kaj en ĉiuj lingvoj oni publikigas librojn, seriozajn librojn, liberecanajn gazetojn kaj revuojn, kiuj disvolvas kion ni provas konigi pere de Esperanto, aperigante tiun ĉi pensaron.

La tie ĉi prezentitaj ideoj povas esti por la leganto, kiu ajn estas lia naskiĝlando,la deirpunkto al pli funda studado. Kiu kapablas senantaŭjuĝe konsideri la aktualan vivon, tiu facile povos konvinkiĝi pri la sincereco kaj la vereco de tiuj ideoj.

La doktrinon, la moralajn kaj filozofiajn teoriojn ni provas diskonigi, prezentante la opiniojn de kelkaj pensuloj al kiuj ne konas la liberecanan ideologion, aŭ al kiuj miskonas ĝin. En alia broŝuro (o) ni pritraktos la praktikajn realigojn, laŭ materiala vidpunkto kaj en ekonomika senco, de la viveblој ekster la Ŝtato kaj la kapitalisma ekspluatado.

Ni do klopodas montri ne nur ke niaj ideoj ne estas utopioj,sed male, ke ili reprezentas, en mondo kie fiaskis ĉiuj politikaj sistemoj, la nuran profunde humanan solvon por ke regu justo kaj libero.

La Liberecana Frakcio de SAT

(o) "Liberecanaj vivkonceptoj pri socio-organizado" verkita de kdo Fontaura, 1970. Havebla ĉe la L.F.

# ŜTATO

## KAJ LIBERO

Kio estas Ŝtato ? Tio estas, respondas al ni la metafizikistoj kaj la jurdoktoroj, tio estas la publika aĵo, la interesoj, la kolektiva havaĵo kaj la rajto de la tuta socio, kontraŭantaj la disfandigan efekton de la egoismaj interesoj kaj pasioj de ĉiu. Ĝi estas la justeco k la realigo de moralo kaj virto sur la tero. Sekve,ne estas pli sublima ago, nek pli granda devo por la individuoj, ol sin foroferi, kaj se bezone morti por la triumfo, por la potenco de la Ŝtato.

Jen en malmulte da vortoj la tuta teologio de l'Ŝtato. Ni nun ekzamenu, ĉu tiu politika teologio, same kiel la religia, ne kaŝas sub tre belaj kaj tre poeziaj ŝajnaspektoj, realaĵojn tre vulgarajn kaj tre malpurajn.

o°o

Grandan eraron faris J.J.Rousseau,pensante , ke la primitiva socio stariĝis per libera kontrakto, inter sovaĝuloj. Sed J.J.Rousseau ne estas la sola, kiu tion asertas. La plimulto el la modernaj juristoj kaj publicistoj,aŭ de la skolo de Kant, aŭ de ĉiu ajn alia individuista kaj liberala skolo, kaj kiuj agnoskas nek la socion fonditan sur la dia juro de l'teologoj, nek la socion difinitan de la Hegel-skolo, kiel pli malpli mistikan realigaĵon de la objektiva Moralo, nek la primitive animalan socion de l' naturalistoj, uzas vole nevole kaj pro manko de alia bazo, la <u>memesprimitan kontrakton</u> kiel deirpunkton.

Memesprimita kontrakto! Tio estas kontrakto sen paroloj, kaj sekve sen penso kaj sen volo - ribeliga sensencaĵo! Absurda fikcio, kaj krome fikcio aĉa! Malinda trompo! Ĉar ĝi supozigas, ke dum mi kapablis nek voli nek pensi, nek paroli - ĉar mi lasas min pritondi senproteste - mi povis konsenti, por mi mem kaj por mia tuta posteularo , eternan sklavostaton!

Fakte, la konsekvencoj de l'<u>socia kontrakto</u> estas malbonegaj, tial ke ili rezultas je absoluta superregado de la Ŝtato. Kaj tamen la principo ĉe la deirpunkto ŝajnas ege liberala. Antaŭ ol ili faras tiun kontrakton,oni su-

pozas la individuojn ĝuantaj absolutan liberon,ĉar laŭ tiu teorio, nur la natura homo, la sovaĝulo, estas tute libera.

Ni jam diris, kion ni pensas pri tiu natura libero, kiu estas nur la absoluta dependeco de l'homsimio fronte al la senĉesa obsedo de l'ekstera mondo... Jen do la primitivuloj, absolute liberaj, ĉiu en si mem kaj per si mem, kaj kiuj ĝuas tiun senliman liberon nur kondiĉe ke ili ne renkontiĝu, ke ili restu aparte en absoluta individua izoleco. La libero de unu ne bezonas alies liberon, kontraŭe, ĉar, tial ke ĉiu el tiuj individuaj liberoj sufiĉas al si mem, ekzistante per si mem, la libero de ĉiu nepre aspektas kiel la neigado de tiu el ĉiuj aliaj, kaj ĉiuj ĉi liberoj, renkontiĝante, devas sin reciproke limigi kaj malpliigi, sin kontraŭi, sin detrui... Por ne detrui sin reciproke ĝis la fino, ili formas kontrakton inter si.

Tiam, ĉion agnoskitan kiel konsistigantan la komunan intereson oni nomis bono, kaj ĉion kontraŭan oni nomis malbono. La kontraktantaj membroj, fariĝinte civitanoj, liginte unu la alian per pli malpli solena kontrakto, per tio mem plenumis devon: dependigi siajn privatajn interesojn de la komuna savo, de la neapartigebla ĉiesa intereso, kaj siajn apartajn rajtojn de la publika rajto, kies unika reprezentanto, la Ŝtato, per tio mem ricevis la povon subpremi ĉiujn ribelojn de la individua egoismo.

o
o o

Do, laŭ tiu sistemo, komenciĝas la homa socio nur kun la plenumado de l'kontrakto. Sed tiam kio estas tia socio? Ĝi estas la pura kaj logika realigo de l'kontrakto kun ĉiuj ĝiaj postuloj kaj konsekvencoj leĝodonaj kaj praktikaj - ĝi estas la Ŝtato.

Ni ekzamenu ĝin de pli proksime. Kion ĝi reprezentas? La sumon de l'neigoj de la individuaj liberoj de ĉiuj siaj membroj; aŭ tiun de l'foroferoj, kiujn faras ĉiuj ĝiaj membroj, abdikante parton de sia libero profite al la komuna havaĵo... Do, tie, kie komenciĝas la Ŝtato, ĉesas la individua libero, kaj reciproke.

Oni rebatos, ke la Ŝtato, reprezentanto de l'publika savo aŭ de l'komuna intereso de ĉiuj, deprenas parton de la libero de ĉiu nur por certigi al li ĉion ceteran. Sed tiu restaĵo, tio estas la sekuro, se vi volas, tio neniam estas la libero.

Libero estas nedividebla: oni ne povas de ĝi depreni unu parton sen mortigi ĝin entute. Tiu eta parto,kiun vi deprenas, ĝi estas la esenco mem de mia libero, ĝi estas la tuto. Per natura movo, necesa kaj nerezistebla, mia tuta libero koncentriĝas ĝuste en la parto, kiel ajn eta ĝi estas, kiun vi deprenas. Tio similas la rakonton pri la de Blubarbulo edzino, kiu havis tutan palacon je sia dispono kun la tuta kaj plena libero penetri ĉien, ĉion vidi kaj tuŝi, escepte aĉan ĉambreton, kiun la suverena volo de ŝia terura edzo malpermesis al ŝi malfermi je mortpuno. Nu, sin deturnante de ĉiuj palacaj belegaĵoj, ŝia animo entute koncentriĝis sur tiu aĉa ĉambreto. Ŝi malfermis ĝin, kaj ŝi pravis malfermi ĝin, ĉar tio estis necesa ago de ŝia libero, dum la malpermeso eniri ĝin estis nepra atenco al la koncerna libero.

Same pri la rakonto de la peko de Adamo kaj Eva: la malpermeso gustumi el la frukto de la kon-arbo,sen alia kialo ol ke tio estas la Sinjora volo, estis fare de l' Bona Dio terure despoteca ago. Kaj se niaj unuaj prapatroj obeus, la tuta homa specio restus en la plej hontiga sklaveco. Kontraŭe, ilia malobeo emancipis kaj savis nin. Tio estis, laŭ la mito, la unua ago de l'homa libero.

Sed ĉu la Ŝtato, oni diros, la demokrateca Ŝtato, fondita sur la libera voĉdonado de ĉiuj civitanoj, povus esti la neigo de ilia libero? Kaj kial ne ? Tio absolute dependos de la rolo kaj de la potenco, kiujn la civitanaro fordonos al la Ŝtato. Respublika Ŝtato, fondita sur la universala voĉdonado, povos esti tre despoteca,eĉ pli despoteca ol la monarkia Ŝtato, kiam, pretekste ke ĝi reprezentas ĉies volon, ĝi pezos sur la volo kaj sur la libera movo de ĉiu el siaj membroj per la tuta pezo de sia kolektiva potenco.

Tio estas je la nomo de tiu fikcio, kiu nomiĝas jen la kolektiva intereso,la kolektiva rajto, jen la volo kaj la libero kolektivaj, ke la jakobenaj absolutistoj, la revoluciuloj de la skolo de J.J.Rousseau kaj Robespierre,

proklamas la minacan kaj nehumanan teorion pri la absoluta rajto de l'Ŝtato.

o
o o

Sed la Ŝtato, oni plu diros, malpliigas la liberon de siaj membroj nur tiom, kiom ĉi-lasta tendencas al maljusto, al malbono. La Ŝtato malhelpas al ili sin reciproke mortigi, rabi kaj ofendi, kaj ĝenerale fari mal bonaĵon, kontraŭe lasante al ili tutan kaj plenan liberon por la bono. Tio ĉiam estas la sama afero pri Blubarbulo aŭ la malpermesata frukto: Kio estas malbono , kio estas bono ?

o
o o

Ĉiu konsekvenca kaj sincera teorio pri Ŝtato estas esence fondita sur la principo de aŭtoritateco, t.e. sur tiu ideo ege teologia, metafizika, politika, ke la popol anaro, ĉiam nekapabla sin regi, devos ĉiutempe elteni la bonfaran jugon de saĝo kaj justo, kiuj, iel aŭ aliel, estos desupre altruditaj al ili.

La Ŝtato, tio estas la regado, desupre ĝis malsupre, super grandega kvanto da homoj tre malsimilaj rilate sian kulturon, la naturon de la landoj aŭ de la lokoj kie ili loĝas, sian situacion, siajn okupojn, siajn interesojn kaj siajn aspirojn, fare de ajna malplimulto; tiu malplimulto, eĉ se ĝi estus milfoje elektita de universa la voĉdonado, kaj kontrolita en siaj agoj per popolaj institucioj, krom se ĝi estus dotita de ĉiosciado, ĉiees tado kaj de ĉiopovo, kiujn la teologoj atribuas al sia Dio, neeblas ke tiu malplimulto povas koni, antaŭvidi la bezonojn, kaj kontentigi, kun egala justeco, la plej pravigitajn, la plej urĝajn interesojn de la tuta popolo.

....La kolektiva vivo ne troviĝas en la popolamaso ; tiu popolamaso, laŭ Mazzini, estas nur tute meĥanika agregato da individuoj, la kolektivo ekzistas nur en l'aŭtoritateco kaj nur per ĝi povas esti reprezentata. Ĉiam temas do pri tiu malbenita funkcio de l'Ŝtato, kiu sorbas kaj koncentras, ĝin detruante, la naturan kolektivon de l' popolo, kaj kiu probable pro tio mem laŭdire reprezentas ĝin kiel Saturno reprezentis siajn filojn, laŭmezure kiel ĝi manĝegis ilin.

La Ŝtato ĉiam estis la hereda posedaĵo de iu ajn privilegiita klaso: eklezia klaso, nobela klaso, burĝa klaso - fine burokrata klaso, kiam, post la elĉerpiĝo de ĉiuj aliaj klasoj, la Ŝtato falas aŭ leviĝas, kiel oni preferas, je la kondiĉo de aparato.

La Ŝtato, tio estas la aŭtoritateco, la organizitaj superregado kaj potenco de la posedantaj kaj laŭdire kleraj klasoj super la popolamaso. Ĝi ĉiam garantias kion ĝi trovas: al iuj ilian riĉecon, al aliaj ilian malriĉecon; al iuj la liberon fonditan sur la proprieto,al aliaj la sklavecon, fatalan konsekvencon de ilia mizero.

o
o o

Ĉiuj Ŝtatoj, de kiam ekzistas tio sur la tero, estas kondamnitaj al senĉesa luktado: luktado kontraŭ siaj propraj popoloj, kiujn ili subpremas kaj ruinigas,luktado kontraŭ ĉiuj fremdaj Ŝtatoj, el kiuj ĉiu potencas nur kondiĉe ke la alia malfortas; kaj ĉar ili povas sin konservi en tiu lukto nur pliigante ĉiutage sian potencon, tiom interne, kontraŭ la propraj subuloj, kiom ekstere kontraŭ la najbaraj potencoj - rezultas el tio, ke la ĉefa leĝo de Ŝtato, estas la pliiĝo de ĝia potenco je la kosto de la interna libero kaj de la ekstera justo.

o
o o

Hodiaŭ ni konkludas je la absoluta neceso detrui la Ŝtatojn, aŭ eble, radikale kaj komplete transformi ilin, en tiu senco ke, ĉesante esti potencoj centralizitaj kaj desupre ĝis malsupre organizitaj, aŭ perforte, aŭ per la aŭtoritateco de ajna principo, ili reorganiziĝas - kun absoluta libero por ĉiuj partoj.

B A K U N I N

...........................................................

Ni neniam forgesu, ke ĉiu registaro estas malbono;ke ĝi estas la abdiko de niaj propraj konscienco kaj juĝkapablo.

GODWIN

Kun la abolo de la politika tiraneco, per si mem mal aperos la ekonomia privilegio.

TUCKER

# LIBERO KAJ PREMADO

La libero ne estas nur la rajto havi proprajn opinion kaj senton. Ĝi estas la rajto esprimi,klarigi,komenti,publike disvastigi, parole aŭ skribe, siajn opiniojn,konceptojn,doktrinojn,kaj proponi ties plenumon aŭ uzon al parto aŭ tuto de la kolektivo.

Eduardo ROTHEN

En "libera socio", ĉiu individuo,ĉiu grupo (granda aŭ malgranda) plene rajtos eksperimenti sian metodon. Kompreneble,iu sistemo pli bone ol alia adaptiĝos al iuj temperamentoj, al iuj lokoj.

Jozefo LABADIE

Dank'al libero, egaleco kaj scienco, la homo povas akiri dignon kaj krei etoson el humana feliĉo surbaze de reciproka justeco. Pere de libero,egaleco, scienco, li povas sin liberigi de ĉiuspeca servuto,ŝtata, kapitalisma kaj religia.

Rikardo MELLA

Oni renkontas multajn homojn parolantajn pri libero, sed malmultajn, kies vivo ne dediĉis sin ĉefe al ĝisfunda kateniĝo.

Gustavo LE BON

Oni forpuŝu ĉian ordonpovon, sed oni trudu al si profundan respekton al sincera konvinko; oni vivu propran vivon, sed oni agnosku al ĉiu la plenan liberon vivi la sian.

Elizeo RECLUS

La liberon vi ne ricevu kiel donacon; oni povas vivi sub diktatoreco, tamen estante libera: sufiĉas lukti kontraŭ la diktatoreco. Kiu proprakape pensas, tiu estas libera homo. Kiu batalas por tio,kion li opinias justa,tiu estas libera homo. Sian liberon oni ne almozu de aliuloj. Oni prenu ĝin.

Ignaco SILONE

Unu tago,unu tuta horo da libero valoras tutan eternecon da sklaveco.

ADDISON

Kio estas la lumo por la okuloj,la aero por la pulmoj,la amo por la koro,tio estas la libero por la homa animo.

G. INGERSOLL

La fundamenta eraro de ĉiuj doktrinoj,kiuj opinias sin kapablaj vivigi la liberon tamen ne rezignante la principon de aŭtoritato, baziĝas sur la konfuzo de la registaraj konceptoj kun la administraj. Kio gravas por reorganizi la socion laŭ libereca spirito, tion Mikaelo BAKUNIN esprimis en tiu klara formulo: "NE REGI LA HOMOJN, SED ADMINISTRI LA AFEROJN". La rolo de kiuj volas levi la liberon ĝis socia principo konsistas, sekve,fari el la komuna laboro de la interligitaj homoj la plenumon de kamarada reciproka devo anstataŭ devon obei al ordonoj. Nenio estas pli erara ol tiu opinio,ke la homo povas labori nur sub la vipo de regpovo. Male : la naŭzo al laboro, jam konsiderita kiel nepra homa karakteraĵo, devenas nur de la sento fari laboron truditan de kunagantaj registaraj komisiitoj.

Eriko MUHSAM

Ni rifuzu aliĝi al la privilegiaj kaj tiranecaj formoj, ni rifuzu servi, kontribui al ĉio, kio emas bremsi la homan liberon,sed,aliflanke,ni tuj inaŭguru la formojn de libera vivo, kiujn perfektigos la sperto,kaj ni realigu inter ni iom da tiu anarkio pri kiu ni parolas inter ni.

HEM DAY

Libera naskiĝis la homo, sed ĉie li estas en katenoj.

ROUSSEAU

La libero konsistas antaŭ ĉio en tio,ke ni volu kaj povu agi en tiu direkto difinita al niaj agoj far nia intelekto, nia spirito, nia krea kapablo, nia perfektiĝemo, nia utilemo.

Gastono LEVAL

Al tiu demando: "Kiel antaŭeviti la ekscesojn de la publikaj instancoj?", GODWIN senhezite respondis: "Tute forigu ilin!", kaj la spertado pri nia moderna socio ŝajnas montri, ke li ne maltrafis la veron.

Georgo WOODCOCK

La libero estas natura leĝo, inter multaj ekzistantaj naturaj leĝoj. Kaj ĉar ĝi estas natura, tial ankaŭ morala ĝi estas.

Alberto CARSI

Kion ĉiu homo devas posedi,tio estas la libero,kiu ebligas la plejeblan disvolviĝon de nia individueco.Sed sopirante propran liberon,li devas kunlabori al la libero de la aliuloj.

Domela NIEUWENHUIS

# MORALO
# KAJ FELIĈO

Nia tuta moralo baziĝas sur la feliĉo de la estuloj, sur la harmonio kaj la ĝojo de la vivo. Ni ja luktas kontraŭ ekscesoj. Ni staras kontraŭ drinkemo, glutemaĉo, kontraŭ ĉiuj perversoj, ne pro religia dogmemo, sed ĉar ni scias, ke ili kontraŭas la korpan ekvilibron, la sanon, la normalan vivon.

Andreo LORULOT

Tiu burĝa socio, en kiu ni vivas, bremsas ĉiun noblan aspiron, koruptas ĉiun altruisman senton kaj disvolviĝas en sterila antagonismo de avidoj, pretendante sin pravigi per tiu pseŭdoscienca formulo, "la porviva batalo".

Anselmo LORENZO

Esti filozofo, tio signifas, ne subtile pensi, eĉ ne fondi skolon, sed sufiĉe ami la saĝon por konformigi sian vivon al siaj principoj, vivi simple, memstare, konfideme. Tio signifas solvi kelkajn vivproblemojn, ne teorie, sed praktike.

Henriko-Davido THOREAU

Ni kreu cirkonstancojn en kiuj la homo ne emu mensogi, trompi, ekspluati la aliulojn; kaj la morala nivelo de la homaro tutnature leviĝos ĝis ankoraŭ nekonata alteco.

Petro KROPOTKIN

Ni bezonas homojn, homojn, kiuj restu fidelaj al la promeso, kiun ili faris al si, fidelaj ne nur kiam tio estas facila, sed ankaŭ malfacila, kiam muĝas la ŝtormo, kiam blankaj kaj fajraj strekoj strias la ĉielon, kiam interbatalantaj fortoj blindigas kaj surdigas, - fidelaj, kiam griza estas la ĉielo, kiam nenio rompas ĝian malesperigan monotonecon. Rezisti ĝis la fino, jen tio, kion signifas havi gvidan ideon kapablan spiti la cirkonstancojn. Kaj la cirkonstancojn knedas tiuj homoj, kiuj ĝisfine rezistas.

Volterina de CLEYRE

Se oni kalkulu kun la efikoj de la ekonomiaj kondiĉoj al la moralo, oni ne forgesu la reefikon de la moralo al la ekonomiaj kondiĉoj, la finan subordigon de la ekonomia stato al la moralo, tiel ke la socia problemo fine estas nur la socia aspekto de la morala problemo.

Paŭlo GILLE

La solidareco, t.e. la harmonio de interesoj kaj sentoj, la kontribuo de ĉiu al ĉies feliĉo,kaj reciproke , - estas la nura stato en kiu la homo povas klarigi sian naturon kaj atingi la plejeblan disvolviĝon kaj bonstaton. Jen la celo al kiu kondukas la homa evoluado; jen la supera principo,kiu solvas ĉiujn nunajn antagonismojn,alie nesolveblajn, dank'al kiu la individua libero trovas, ne limon, sed komplementon en la libero de aliuloj.

Eriko MALATESTA

Ni konceptis la vivon kiel senĉesan batalon, ĝuste por igi ĝin pli nobla,pli bela kaj pli fekunda. Aliaj bezonas premi sian najbaron por kredi pri propra altiĝo. Laŭ ni, en ĉies plialtiĝo troviĝas la plej granda ĝojo el la homa vivo.

Luizo BERTONI

Restas multo farenda antaŭ ol la interhelpo kaj memstaro plene harmonios en vera frateco. Sed scii,ke al tio sin direktas la homara estonto, sufiĉas por refreŝigi nian esperon, malgraŭ la nunaj malĝojoj.

L. BARBEDETTE

Por esti homo, kiam oni parolas, necesas esti la voĉo de konscienco. Ĉu povas ekzisti konscienco ĉe registo aŭ ĵurnalisto,kiu almozpetas la sekretajn kasojn aŭ grandan eldonnombron? Ĉu iu parolanta pri disciplino ne tiel konfesas, ke li ne plu aŭskultas sian konsciencon?

Han RYNER

Mi mem estas homa kaj libera nur laŭmezure kiel mi agnoskas la liberon kaj la homecon de ĉiuj min ĉirkaŭantaj homoj.

BAKUNIN

Justo estas la spontane sentata kaj reciproke garantiata respekto al la homa digno,ĉe iu ajn persono kaj en iu ajn cirkonstanco ĝi troviĝas endanĝera,kaj kiom ajn ni riskas por defendi ĝin.

PROUDHON

Perforto estus jam venkita de racio kaj eduko,sed la akumulado de riĉaĵoj plifirmigis ĝian regnon. La fakto, ke iu posedas en abundo aĵojn,kiuj totale mankas al aliaj,estas fekunda krimfonto.

GODWIN

Justo entenas ĉiujn moralajn devojn.Se ĝi devas havi signifon,tiu ja estas jena: estas juste,ke mi plejeble kontribuu al ĉies bonfarto.

GODWIN

# LABORO KAJ SINDIKATISMO

Sindikata organizo estas rifuĝejo,kiu certigas al la laboristo la protektadon kaj la defendon de liaj profesiaj interesoj frate kaj solidare intermiksitaj. Socie, ĝi estas eminenta liberigilo,timata de la ekspluatantoj kaj de la regantoj. Jam plurfoje,la ĝenerala striko - kun aŭ sen uzin-okupado - ekskuis la kapitalisman socifundamenton kaj ŝancelis la tutan socikonstruaĵon.

L. RENARD

Pli kaj pli la laboristo kutimiĝas konsideri la uzinon,la fervojon,la minejon, ne kiel feŭdan kastelon de iu nobela moŝto, sed kiel institucion publikutilan,kiun ĉiuj rajtas kontroli.

Petro KROPOTKIN

Sindikatismo estas la movado de la laboristaro , kiu povas atingi la plenan posedon de ĝiaj rajtoj super la fabriko kaj la laborejo; ĝi asertas,ke tiu plenakiro , celanta efektivigi la emancipon de la laboro, estos la produkto de la propra kaj senpera penado de la laboristo mem. Konsekvence,sindikatismo proklamas, ke estas devo por la laboristo memagi, memlukti, membatali, kio estas la solaj kondiĉoj ebligantaj al li realigi sian tutan liberiĝon.

V. GRIFFUELHES

Ni estas laboristoj. Ni jam de longe akceptis la socialan formulon: "Nek devojn sen rajtoj, nek rajtojn sen devoj". Ni devas strebadi por la forigo de la salajreco kaj postuli nian parton el la universala heredaĵo.

Francisko FERRER

La burĝoj diras,ke de kiam ne estus premdevigoj,tiam la laboristoj malpli laborus, malpli energie, kaj kapablus neniun foroferon, eĉ profite al sia revolucio.

Hektoro MOLINARI

Ni spertas,ke la evolutendenco de la homaro kliniĝas al niaj ideoj: ekstermo de ĉia sistemo bazita sur salajreco, la produktoj de la naturo kaj de la homlaboro al la dispono de ĉiu homo.

Petro RAMUS

Laŭ la revolucia sindikatismo, la proletoj,organizitaj sur ekonomia kampo, plu fidas nur siajn proprajn eduk-, organiz- kaj agad-fortojn por akiri el la mastroj kaj regantoj la tujajn kontentigojn,kiujn ili postulas. Ili tute ne plu fidas la parlamentajn reformojn. Ili tiom konscias,ke nur en ili mem troviĝas la savo, ke ili ne lasas sin logi per la demagogiaj frazoj de l' profesiaj politikistoj aŭ de la intelektuloj, eĉ demokrataj. Georgo YVETOT

La laboristoj disponas timegindan potencon. Se fine ili ekkonscius pri tio,kaj decidus ĝin uzi, nenio kapablus rezisti al ili: sufiĉus, ke ili ĉesigu ĉiun laboron kaj alproprigu ĉiujn produktojn, tiujn de ili mem naskitajn produktojn. Makso STIRNER

Dum kelka tempo,en pluraj landoj,oni nomis sindikatismo la laboristan sindikatan movadon, kiu celis anstataŭigi la kapitalismon kaj la Ŝtaton, kaj la aron da ideoj, el kiuj oni provis krei novan doktrinon,k kiujn esprimis tiucele certa nombro da teoriistoj. La planita agrimedo devus esti unue la parta kaj depostula striko, la ĝenerala kaj ekspropriga poste. Gastono LEVAL

Anarkismo havas neniun el la rimedoj kiuj allogas la amason, nek vastajn organizojn, nek materiajn profitojn oferteblajn,nek balotadojn, nek balotilojn, kiuj iluzias kvazaŭ oni partoprenus la regpovon.

Tial, la anarkistoj, kiuj volas plivastigi sian socian agadon kaj rekte influi la aliiĝon de la socio , orientante ĝin tiamaniere ke la estonta socio estu tolerebla medio por la liberaj homoj, por sendependaj individuecoj, la anarkistoj estas alkondukitaj aliĝi al pli vastaj ariĝoj ol la anarkistaj grupoj: tiuj ariĝoj estas nenio alia ol la laboristaj sindikatoj.

Jako MESNIL

Antaŭ la necerta rezultato de sia strebado,la laboristoj rapide konsciis, ke la celo de la batalo devas esti la neniigo de la mastra ekspluatado. Ili pli kaj pli estas konvinkitaj, ke ilia kompleta emancipiĝo estos ebla nur per la ekposedado de la produktrimedoj,por ke ili tiel povu libere kaj komplete ĝui la produktojn de sia laboro.

Marko PIERROT

# RELIGIOJ

# KAJ SUPERSTIĈOJ

Rilate religion,la anarkistoj estas ateistoj, ĉar ili konsideras,ke la Dia aŭtoritato kaj la religia morala sankcio estas la ĉefaj pretekstoj elvokitaj de la privilegiaj klasoj por apliki la homan aŭtoritatecon.

Benjameno R.TUCKER

Tre certe, la stulteco,la minacoj,la premdevigo,povas estigi nur la hipokriton,la malvirton,la diboĉon. Tial, la katolika religio estas ne nur nukso en kiu nenio estas manĝebla, sed koruptilo de la homa koro.

Gabrielo GOBRON

Vi diras,ke vi kredas je la neceso de la religio ? Estu sinceraj! Vi kredas je la neceso de la polico!

NIETZSCHE

La Eklezia spirito laŭlonge de la jarcentoj tute ne ŝanĝiĝis. La Inkvizicio,kiu fontas el la Biblio, estas implicita ĉe la Ekleziaj patroj,same kiel ĝi ankoraŭ vivas ĉe la episkopoj, kardinaloj kaj papoj. Ĝi estas logika sekvo de la fanatikeco de tiuj sektemaj kreduloj , persvaditaj ke ili posedas la tutan veron.

K. BOUSSINOT

La moralo de ĉiuj religioj estas preskaŭ sama; ankaŭ la historio de ĉiuj kultoj estas sama. La homoj,en ĉiuj tempoj,faris el la religio ilon de ambicio kaj de maljusto.

GRIMM

La kristana religio falos,kiel jam falis la malnovaj religioj. Ĉiuj tion sentas, necesas nur kelkaj jaroj.Ĉu alia religio anstataŭos ĝin? Aŭ ĉu la epoko de mistikismo malaperos definitive? Ĉu la epoko de la racio malfermiĝos?

Paŭlo LAPEYRE

La homo agnoskas la veron nur per la racio,kaj ne per la kredo.

Leo TOLSTOJ

Ĉiuj religioj,kun siaj dioj,siaj duondioj kaj siaj profetoj,siaj mesioj kaj siaj sanktuloj,estis kreitaj de la kredema fantazio de la homoj ankoraŭ ne atingintaj plenan disvolviĝon kaj plenan posedon de siaj intelektaj kapabloj.

BAKUNIN

Estas ja la riĉuloj kaj la potenculoj,kiuj vivtenas la religion. Certe,tio estas parto de la medio. Tio estas eĉ afero pri morto aŭ vivo por la profituloj, la burĝoj,ke la popolo estu stultigata de la religio. La potenco kreskas aŭ falas kun la religia frenezo. Ju pli la homo ŝatas la religion,des pli li kredas. Ju pli li kredas,des malpli li scipovas, des pli stulta li estas. Ju pli li estas stulta,des pli facile li sin lasas regi.

Johano MOST

La materialismaj tendencoj elmontriĝas,firmiĝas,disvolviĝas,fervore atakante la krudan kaj infanecan spiritualismon de la antaŭaj jaroj. La Dia hipotezo pli kaj pli foriĝas. Regresanta Dio ĉesas esti Dio. Nerezistebla fluo forportas al ateismo niajn seniluziigitajn generaciojn. Ju pli la homo kleriĝas,des malpli li estas preta kredi,kaj vere oni sin demandas,kial niaj generacioj ankoraŭ hezitas sin liberigi el malaperanta kredo.

Sebastiano FAURE

Estas ekstere de la Eklezio,kiu fiaske erarigis ĉiujn grandajn esperojn,ke efektiviĝas ĉio nobla kaj grandanima. Kaj estas ekstere de ĝi,malgraŭ ĝi,ke la malriĉuloj, al kiuj la pastroj ironie promesis la Paradizajn riĉaĵojn, finfine konkeras la bonstaton de la nuna vivo: estas malgraŭ la Eklezio, ke fondiĝos la vera Komunumo,la socio de liberaj homoj.

Elizeo RECLUS

Se mi ne kredas al Dio,mia justeca idealo estas surtera plenumado kaj de tiam mi havas bonajn kialojn por akcepti nek ekspluatadon nek tiranecon. Mia simpla spirito ŝanĝiĝas en kritikan spiriton, mia humileco en fieron, mia rezigno en ribelon. Kredulo,mi konsideras,ke ĉio ekzistanta estas Dia verko; ke niaj monstraj institucioj estas Dia volo por nia plej granda profito; ke deziri ŝanĝi la dian verkon estas sakrilegio. Ateisto,mi pensas, ke tiaj institucioj estas ellaboraĵo de fiuloj kaj ke tute transformi ĝin estas sankta afero.

Emilo CHAPELIER

LAPLACE diris: "La Dia hipotezo estas senutila." De tiam la sciencoj progresis; la rezulto de iliaj esploroj super la homa kampo kaj la homaj societoj ebligas diri: la Dia mensogo estas malutila, kio alimaniere estis asertita de PROUDHON per la fama aforismo: "Dio estas la malbono".

Manuelo DEVALDES

# M I L I T O

# K A J   M I L I T I S M O

Nun forigu la militon, la armilarojn, la landlimojn, la kazernojn, la armilfabrikojn ktp. Detruu la armilojn mem, ĉesigu la armadon, la strebdeziron pri venkakiroj kaj la imperiistajn rivalecojn, t.e. la tutan frenezegon de nia epoko, kaj la vivo de nia socio estos funde aliigita, tiom ĝi estas tutinfektita de putraĵo. VOLIN

Estos dank'al la libro kaj ne per la spado, ke la homaro venkos la mensogon, la maljuston, kaj konkeros la ĉiaman pacon de la interpopola frateco. Emilo ZOLA

Ĉiu progreso bezonas normalajn kondiĉojn, se ne favorajn, kiujn la daŭre minacanta milito rifuzas senĉese al la sociala vivo de l'homoj. Makso NETTLAU

Laŭmezure kiel disvolviĝas la internaciaj rilatoj, la milito, kiu komence damaĝis serioze nur la militantajn landojn, iĝis pli kaj pli noca por la komunumo de la civilizitaj popoloj. Hektoro MOLINARI

Estas samtempe false kaj tendence, aserti ke milito estas la normala stato de la vira duono de la homaro ; milito devenas de supro, ne de malsupro. Planas kaj efektivigas ĝin la gvidistoj, laŭ sia propra intereso.
Doktorino PELLETIER

La ĉefa karakteraĵo de la milito funde estas la plezuro buĉi sen timi punon. Ĝi sovaĝigas la homon. La plezuro mortigi pluekzistas, malgraŭ la civilizacia progreso, nur pro la militkutimo. Eŭgeno RELGIS

La patriotismo estas artefarita kaj neracia sento, pereiga kaŭzo de la plejmultaj mizeroj, kiuj plagas la homaron. Leo TOLSTOJ

La patrolando? Kion tio signifas al franca laboristo, kiu malŝarĝas germanan ŝipon en kosmopolita haveno? Ĉu gravas al franca laboristo pliriĉigi francan kapitalismon prefere ol germanan kapitalismon ? Remo de GOURMONT

La banko, tio estas la mono de la aliaj, kaj la patriotismo, la vivo de la aliaj homoj.
LA FOUCHARDIERE

La du provincoj,kiujn la popolo devas restituigi al si estas: la bonstato kaj la libero. Kiam tiu granda justeca ago estos finplenumita, tiam ne plu sensencaj militoj, ne plu stultegaj buĉadoj. Por ĉiam repacigitaj, ĉiuj homoj batalos kontraŭ la malsanoj,la plagoj,la kontraŭ ili koaliciintaj elementoj, la doloro, kiel ajn ĝi prezentas sin. Ili trovos por sia denaska batalemo gloran kampon, fekundan kaj senliman.

Sebastiano FAURE

La milito brutigas, malklerigas kaj koruptas la homan spiriton por fari el ĝi venenitajn militemajn cerbojn. Ĝi ebligis kaj tiel pravigis la plej abomenajn krimojn, ĉiujn kruelegaĵojn kaj sennomajn malhumanaĵojn! Kaj tio, nur por foje kontentigi la sangavidajn instinktojn kaj la fieron de la militestroj, ambiciaj karieristoj soifantaj "gloron" kaj "honorojn". Ĝi vekis la heredojn de la prapatra barbareco, kiuj dormetis ĉe la fundo de la homa estaĵo.

L. RENARD

Mi vere ne komprenas, kial estas pli glore bombardi urbon, ol hakbuĉi iun.

Fedoro DOSTOIEVSKIJ

Samajn motivojn havas ĉiuj nuntempaj militoj: la potencdeziron de la aŭtoritato kaj la ekspluatdeziron de la monopoloj. Nur ĝis ia limpunkto la Ŝtato povas garantii pacon en la socia vivo. Tuj kiam la profitoj kaj la potenco de la Ŝtato estas endanĝeraj, nur unu principo valoras: la perforto, la supereco de la plej forta.

Petro RAMUS

Mi kredas, ke la homaro estas nedividebla tuto: mi kredas, ke la homa personeco estas la esprimo de la universa spirito. La milito profanas la spiritajn fortojn de la homa gento. Ĝin mi ne povas partopreni.

Fenner BROCKWAY

Kiam intermilitas la riĉuloj, tiam mortas la malriĉuloj.

J.P. SARTRE

Eĉ se oni pruvus al mi, ke per milito mia idealo havus ŝancojn realiĝi, mi tamen rifuzus la militon. Ĉar oni ne konstruas homecan socion sur amasoj da kadavroj.

Ludoviko LECOIN

# AMO

# kaj GEEDZECO

Nur io devas kaj povas devigi la viron resti kun sia kunulino, la patron prizorgi siajn infanojn. Tio estas ne la devigo trudita de la leĝo,sed sento,kiu devenas de la naturo, nome, la amo. Amo primokas la kodon kaj la tribunalojn, la juĝiston kaj la ĝendarmon. Ĉiuj same senpovas,tiom por estigi kiom por malhelpi la elburĝonigon de tiu belega floro.

Sebastiano FAURE

Oni ne konfuzu amon kaj geedzecon. Geedziĝo estas kontrakto; amo estas kiso. Geedzeco estas malliberejo; amo estas florado. Geedziĝo estas prostituado de la amo. Por ke ĝi konservu sian belecon kaj sian dignon, amo devas esti libera, kaj ĝi povas esti tia, nur restante sub sia propra leĝo. Pri tio ne povas ekzisti materiaj aŭ moralaj konsideroj. Du estuloj sin amas reciproke, sin deziras. Ili rajtu oferi unu al la alia sen ke ia ajn kialo fremda al ilia deziro intervenu inter ili. Same kiel ili absolute rajtu resti liberaj, kiam ili ne plu sin deziras reciproke. Kaj mi diras ne "kiam ili ne plu sin amas reciproke", sed precize kiam ili ĉesas deziri unu la alian. Ĉar estas tio malsimilaj aferoj.Eblas ne plu deziri virinon kaj tamen plu ami ŝin; eblas ne plu akcepti la amanton kaj tamen resti fidela al la amiko. Tio estas tiel bone konata psikologia kazo, ke ne necesas, ke mi insistu.

Magdalena VERNET

Amo, tia kia ĝi ekzistas en la socio, estas nur interŝanĝo de du fantazioj kaj kontakto de du epidermoj.

CHAMFORT

Ankaŭ la "nelibera" amo (geedzeco,prostituado ktp) estigas difektojn kaj malbelaĵojn,multe pli gravajn ol tiuj de la libera amo. Ĉiu sociala teorio estas elmetita al misformado.

Andreo LORULOT

Geedzeco,laŭ sia nuna ekzisto,estas la plej abomena el ĉiuj mensogoj,la supera esprimo de egoismo.

Leo TOLSTOJ

Komunigi malamojn, tion tre ofte oni nomas amo.

Henriko DUVERNOIS

"Ne amo ekster geedzeco": tio estas la eklezia ordono,kiu alnajlis la flugilojn de Kupido al ĉiuspecaj fostoj; kiu kruele krimkulpigis la adultojn, punante ilin per la plej barbaraj torturoj; kiu deklaris honesta la edziniĝitan patrinon kaj malhonesta la fraŭlan patrinon, kondamnante la "elnaturajn" infanojn al ĉies hontigo, barante al ili la vojon al la pastreco.

Kamilo BERNERI

Amo estas la nura okazo por maturiĝi,por sin formi, por mem fariĝi mondo, cele al la amo de l'amato.

R.M. RILKE

Tri semajnojn oni observas unu la alian; oni sin amas reciproke tri monatojn; oni interdisputas tri jarojn; oni toleras sin reciproke tridek jarojn; kaj rekomencas la infanoj...

Hipolito TAINE

Amo estas la lastega signifo de ĉio nin ĉirkaŭanta. Ĝi ne estas simpla sentimento, ĝi estas la vero, la ĝojo, el kiu fontas ĉiu kreaĵo.

R. TAGORE

Nur la amo, kiu ekfloras en vera interŝanĝo, estas vera amo, en kiu ĉiu "animo" povas retrovi sian kunulon.

Marteno BUBER

Amo fontas el la reciproka altiro de du estuloj kun sufiĉa volo por sin oferi reciproke.

Alfredo ADLER

Amo,laŭ mia opinio, estas la fortega afineco, nerezistebla, de du korpoj, kiuj sin reciproke deziras,de du inteligentoj kiuj sin interkomprenas, kaj de du intersimpatiantaj konsciencoj. Fizika afineco, intelekta afineco, morala afineco, jen estas la tri afinecoj , kiuj determinas tiun ĝeneralan, fortegan, nerezisteblan sentimenton: la amon.

E. ARMAND

Pri amo, mi konas nur tiun miksaĵon el deziro,korinklino kaj kompreno, kiu ligas min al iu estulo. Tiu miksaĵo ne estas sama por alia persono. Ĉiujn ĉi travivaĵojn mi ne rajtas nomi per sama nomo.

Alberto CAMUS

Ĉu libera amo eblas, sen ŝanĝi la funkciadon de socio,en kiu produktado kaj konsumado estus liberaj? Ni respondas: Jes.

E. BEAURE

# POLITIKO KAJ MENSOGOJ

Vin oni trompas, bonaj elektontoj, oni mistifikas, oni flataĉas, kiam oni diras al vi, ke vi estas belaj, ke vi estas la justo, la rajto, la nacia suvereneco, la reĝo-popolo, liberaj homoj. Vi voĉdonas, kaj ne pli. Ek! popolamasoj! Ek! elektontoj! Al la urnoj!... Kaj ne plu plendu! Sufiĉas. Ne provu kompatigi pri la sorto, kiun vi mem faris por vi. Ne insultu, tro malfrue, la Mastrojn, kiujn vi mem donis al vi.

ZO D' AXA

Ni devas montri al la homaro novan vojon, kiu konduku ĝin al nova destino. Por protekti ĝin kontraŭ la dekadencoj, ĝia estonto devas esti liberigita el la aŭtoritataj strukturoj, kiuj naskas la subpremon kaj la sklerozon de la ekspluat-ekonomio kondukanta al katastrofo, el la superregantaj teknokratiaj meĥanismoj, kiuj formalaperigos ĝin en novaj bestaĉaj formoj.

Gastono LEVAL

La plej bona registaro estas tiu, kiu tute ne regas. Kaj kiam la homoj estos preparitaj por tio, tiun formon de regado ili havos.

Henriko-Davido THOREAU

Tiuj, kiuj volas doni la superregon al la klerikularo, same kiel tiuj, kiuj atendas ĉion de pli malpli laika Ŝtato, ĉi ĉiuj asertas, ke ĉiam estos riĉuloj kaj malriĉuloj, servutuloj kaj mastroj.

Francisko FERRER

Ĉiu regpotenco, ĉiu registaro, ĉiu Ŝtato kuŝas sur perforto, ruzo, moktrompo, perfido. Neniu homo pli ol alia havas regorajton. "Diktaturo", "demokratio", "popola suvereneco" kaj eĉ la fama "proletara diktaturo" estas nur fikcioj kaj pereigaj vojeraroj. Ĉiu regpotenco kaj ĉiu ŝtato estas malbonaĵo kaj danĝero por la homa socio. Jen kio aktuale estas demonstrata ĉiutage, laŭ konkreta, palpebla maniero kaj kun nekomparebla forto far la nun aktivaj registaroj mem, kaj en ĉiuj landoj.

VOLIN

La registaro havas longan brakon kaj mallongan; la longa servas por preni kaj ĉien trafas; la mallonga brako servas por doni, sed ĝi atingas nur tiujn, kiuj tutproksimas.

Ignaco SILONE

La demokratiaj registaroj estas tiuj, kiuj plej facile kuraĝas fari la tutkontraŭon de tio, kion deziras la amasoj.

Vilhelmo FERRERO

Aŭtoritato, tio estas servuto, subpremo por ĉiuj membroj de la Socio; ne la parta servuto kiel tiu, kiu povas rezulti el la nura ekonomia maljustego, sed servuto totala, absoluta, konstanta; tiu, kiu prenas la tutan estulon, lin kaptas en la lulilo, sekvas lin ĉie sen iam lasi al li paŭzeton, anstataŭigante lian volon per fremda volo , tiel ke li ne plu estas sia propra mastro, kaj forprenante de li ĉiun esperon pri ebla emancipo.

Sebastiano FAURE

En la aktuala socio, haladzigita de la konvenciaj ruboj kiel proprieto, patrio, religio, familio, de la nescio, dispistita de la registaraj fortoj kaj la inerto de l'regataro, volas ne ankaŭ mi malaperi, sed enigi en tiun socion la sunon de l'vero, en ĝin ĵeti desinfektilon,purigi ĝin per ajna rimedo.

Alberto LIBERTAD

Mi estas anarkisto. Kaj tial mi volas nek superregi, nek esti superregata. J.H. MACKAY

La ĉefaj kaŭzoj de la mizero kaj de ĉiuj sociaj malbonoj estas: unue, la individua proprieto kiu malebligas labori al la homo, se li ne submetiĝas al la kondiĉoj trudataj al li far la posedantoj de la tero kaj de la laboriloj; due, la registaroj, kiuj protektas la ekspluatantojn kaj mem ekspluatas por sia propra profito.

Eriko MALATESTA

Socia revolucio havas ŝancojn serioze sukcesi, nur se preparita de praktika evoluo, antaŭita de provoj pri nova organizado. Vidu la rusan revolucion, devigitan retreti tial ke la proletaro ne sciis mem organizi sin , ekstere de la Ŝtato.

Georgo BASTIEN

Homoj estas homoj, kaj vi ne povos doni al individuo parton de aŭtoritato, sen korupti lin.

KROPOTKIN

Anarkismo celas realigi ordon en ĉiuj publikaj aferoj per kontraktoj inter federe organizitaj komunumoj kaj societoj.

LAMBROSO

La pozitiva rajto esprimiĝas per la leĝoj. La leĝoj, kiel ĉio cetera en la socia sistemo, estas ellaboritaj por ununura celo: firmigi la pluigon de la reganta potenco, t.e., aktuale, protekti la proprieton, la privatan riĉecon, la kapitalistan ŝtelon, eĉ je la malprofito de la vivo. Ĉar la proprieto fontas el la forto, tial per la forto ĝi konserviĝas kaj ĝi reproduktas la forton por la profito de la proprietulo. Aŭskultu PROUDHON: "Proprieto, tio estas Ŝtelo!" . Aŭskultu SISMONDI: "La plej granda parto el la kosto de la socia organizado estas destinita defendi la riĉulon kontraŭ la malriĉulo".

Manuelo DEVALDES

Tiom longe, dum ni havos kaston da senfaruloj, vivtenataj de nia laboro, pro la preteksto ke ili necesas por nin direkti, tiuj senfaruloj ĉiam estos pesta fonto por la publika moralo.

KROPOTKIN

............................................................

Certe, se vi deziras sukcesi en la mondo, ne estu anarkisto. Ĝentile obeu, eble iam vi sukcesos komandi. Vi havos lakeojn, kaj senkuraĝulaĉoj venos diri al vi, ke vi estas bela kaj talenta. Sed se, antaŭ ĉio, ĉefas por vi scii la veron kaj laŭ ĝi reguli vian vivon, pensu por vi mem, transpasu la ricevitajn ordonojn, la konvenciojn kaj la tradiciajn formulojn, la leĝojn faritajn por ŝirmi la riĉulon kaj senvirecigi la malriĉulon, estu via propra profesoro kaj via mastro, kaj eble oni nomos vin frenezulo, difektulo, sed almenaŭ via vivo ja estos via kaj vi havos la perfektan ĝojon koni egalulojn kaj amikojn.

Elizeo RECLUS

--==o==--

Gérant & imprimeur: Baudé, F 47340 Laroque Timbaut
Commission paritaire de presse..........n° 39 863